

Johann Wolfgang von Goethe, Trovaĵo	Johann Wolfgang von Goethe, Gefunden	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita
<i>tradukita de Ri- chard Schulz</i>		<i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>	<i>tradukita de Antoni Grabowski</i>
Mi vagis sola En la arbar'. Nenion serĉi Jen mia far'.	Ich ging im Walde So für mich hin, Und nichts zu suchen, Das war mein Sinn.	Mi tra arbaro Sencele iris Kaj trovi ion Mi ne deziris.	Mi foje arbaron Promene eniris, Kaj serĉi nenion En penso deziris.
Enombre vidis Floreton mi. Lumanta stelo, Okulvizi'.	Im Schatten sah ich Ein Blümchen stehn, Wie Sterne leuchtend, Wie Äuglein schön.	Ĉe l' vojo vidis Mi etan floron, Kaj ege tuŝis Ĝi mian koron.	Mi vidis, en ombro Jen staras floreto: Steleto lumanta Aŭ blu-okuleto.
Al mi plukonta Jen ĝia vort': „Ĉu ke mi velku Al frua mort' ?“	Ich wollt' es brechen, Da sagt' es fein: „Soll ich zum Welken Gebrochen sein?“	Kaj kiam volis Mi ĝin deŝiri, „N rompu min!“, mi Ĝin aŭdis diri.	Mi volis ĝin ŝiri, Sed plore ĝi diras: “Ĉu por ke mi velku, Vi tial min ŝiras?”
Mi ĝin elfosis Kun la radik' Ĝin portis domen Al la larik'.	Ich grub's mit allen Den Würzlein aus, Zum Garten trug ich's, Am hübschen Haus.	Kaj mi singarde Ĝin elterigis, Al mia domo Ĝin translokigis.	Do mi ĝin elfosis Kun radikareto, Kaj portis al mia Ĝarden' ĉe l' dometo.
Replantis tie Ĝin en la fru'. Ĝi nun kreskadas Kaj floras plu.	Und pflanzt' es wieder Am stillen Ort; Nun zweigt es immer Und blüht so fort.	Alialoke Ĝi nun kreskadas, La eta planto Kaj plu floras.	En loko trankvila Plantite karese, Ĝi kreskas, burĝonas, Kaj floras senĉese.
...

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984-07.

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).

Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982-05-05.

MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)

Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/rovita.html>.